ISNN 0949-9830

# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 25 Eberswalde 1992-04-18

1. Informoj pri aranĝoj kadre de la UIFRO- Kongreso 1992 kaj la IFRE- kunveno en Eberswalde

2a de Septembro:
Komuna kunsido de la laborgrupoj S6. 03 “Informaj kaj Terminologio” kaj P6. 01.00 “Forest Decimal Classification” (en la laborlingvoj de IUFRO) en la Teknika Universitato Berlin

“Information systems serving forestry research”

10.30- 12.30: Session I
Becker, K. M.; Elbourn, C. A. ( United Kingsdom): Forestry information services and knowledge transfer in the 1990s
Schrader, S. ( Germany): Bibliographical, informational, and termino logical activities within IUFRO since 1901 – a historical review
Schenker. R. ( Switzerland): The forest decimal classification. The role of the German version in a centry

14.00- 15.30: Session II
Lym, B. ( USA): The [U. S.] Forest Service information network and Internet. Technical and policy issues
Simon, K. –H. ( Germany): A terminology of forestry and a multilingual forestry dictionary
Koler, T. ( Slovenial): Presentation of Slovene INDOC activies in fo-restry
Poster presentations

3a de Septembro:
a) Labor-kunsido de S6. 03
b) Vizito en la Centro por Dokumentado pri Fitomedicino ĉe la Federale Esplor-centro por Agrokulturo kaj Forstmastrumado en Berlin

4a de Septembro:
Komuna rigardadoj en la ĉirkaŭo de Eberswalde por IFREanoj:
- Ruinoj de la Monaĥejo Chorin
- Ŝiplifto Niederfinow

aŭ sendependa partopreno en la oficialaj ekskursoj
aŭ sendependa rigardadoj de Berlin
16.00 – 18.00: Ĉef-kunveno de IFRE en Eberswalde
18.00 Komuna manĝado
19.00 – 21.00: Terminologia kunsido de IFRE- anoj

5a de Septembro: Ekskurso por IFRE-anoj
Jen niaj proponoj, kiuj rilatas la temojn de la oficialaj ekskursoj,
sed kiujn ni povas sole okazigi

V 6 Forstbotanika ĝardeno
V 9 Instajo de lizimetregoj
V 11 Longtempaj esplorareoj kun kverko, piceo, kaj nehejmaj arbospecioj
V 12 Esplorareoj pri mastrumado de pinarbaroj, celante valoran krudlignon
V 13 Mastrumado de kverko-arbaroj kaj fago-kverko – arbaroj
V 14 Akcelado kaj sekurigado de ekspluataĵo per sub- kaj preforstizo sub pinoj
V 15 Deveno-esploroj pri pino kaj duglasio
E 3 Ekologia transformado de malriĉigitaj pinarbaroj (forstodistrikto Schwenow, ĉ. 100 km sude de Eberswalde)
E 11 Mastrumado de pinarbaroj sur magraj kaj mezfekundaj starejoj en la ĉirkaŭo de Eberswalde
E 14 Ekspozio pri la historio de IUFRO, pri la historio de la forstfaka instruado kaj esploro en Eberswalde ( Forsta Muzeo)

Bonvolu informi nin pri via intencita partopreno kaj proponoj rilate ekskursojn aŭ aliajn aferojn. Ĝis nun nur malmultaj IFREanoj informis pri sia opinio rilate la venontan IFRE-kunvenon.

2. Informo pri la nuna fazo de la terminologia/vortara laboro

La intencita pretigo de la vortaro-manuskripto ĝis la fino de 1991 ( vd. FI No. 24) ni ne povis atingi. La resendato de la prilaboritaj materialoj malfruiĝis. Difektojn de la komputiloj ne povis esti forigitaj pro manko da mono. Pluaj malfacilajoj estiĝis pro la fermado de la Instituto por Forstosciencoj Eberswalde laŭ Leĝo pri la Unuigo de Germanio.
Sed ni provis uzi estiĝintajn eblecojn. Tiel estis ebla proponi “laborhavigan projektojn por senlaboruloj. Nun la laboroficejo pagos ĝis la mezo de la jaro 1993 al naŭ senlaborulaj gesciencistoj kaj sciencaj gekunlaborantoj modestan salajron pro preparado de multilingva forsta vortaro. Ni nun ankaŭ povas traduki la difinojn en aliajn mondlingvojn kaj enigi arabajn, japanajn kaj ukrainajn ekvivalentojn. Do, la situacio de nia laboro pliboniĝis almenaŭ dum kelka tempo.
La eksplodo de la poŝtaj prezoj en kelkaj landoj sen konvena plialtigo de salajroj tre damaĝis la interkomunikiĝon de esperantistoj. Ni provas per elsendo de Internaciaj Respondo-kuponoj limigi la damaĝon por la vortara laboro.
En marto ni povis elsendi la .4- version de la slipoj( = artikoloj) kaj nun preparas la .5- version. Ĝi estu prezentota kiel provekzemplero de la vortaro dum la IUFRO-kongreso.

K. –H. Simon

**fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich**